# Esperantisto Slovaka

Organo de Slovakia Esperanta Federacio. Fondita en 1946 de Ernesto Váňa.
3/2015
ISSN 1335 5031

SOMERA ESPERANTO-STUDADO
SES
www.lernu.net




Speciala numero dediĉita al la jubileaj

## 10-a Somera Esperanto-Studado en Martin, Slovakio

## 100-a Universala Kongreso de Esperanto en Lillo, Francio

# Enhavo / *Obsah*

La deka kaj la lasta SES
*Desiate a posledné SES* ....................3
La aliaj ne estas strangaj kaj mi ne estas normala / *Okolie nie je čudné a ja nie som normálny* ............5
Informoj pri la 100-a UK en Lillo, Francio / *Informácia zo 100. UK v Lille, Francúzsko* .........................12
Instrua UK en Lillo, Francio
*Poučný UK v Lille, Francúzsko* .....22
Sur la kovrilo: Partoprenantoj de la 10-a SES en Martin
*Na obálke: Účastníci 10. SES v Martine*. Foto: Andrzej Sochackij

## Subtenu nian UK-on, subtenu slovakan Esperanto-movadon!

**SKEF havas novan banko-konton, dediĉitan al la 101-a UK, por povi bone administri la organizadon de la unua Universala Kongreso de Esperanto en Slovakio en julio 2016 en Nitra.**

Se vi ŝatus helpi, eblas tion fari ankaŭ per via financa helpo (kompreneble ankaŭ alispeca helpo bonvenas). Por ajna sumo, kiu ebligos krei neforgeseblan kongreson, ni estos pli ol dankemaj, kaj nomojn de ĉiuj donacintoj ni aperigos en la retejo de la kongreso ***www.nitra2016.sk***

Fio banka, nomo de la konto: Slovenská esperantská federácia, numero de la konto:

Slovakio: 2600820124/8330
Ĉeĥio: 2600820124/2010

En Fio-banko eblas pagi en ambaŭ landoj sen kromkostoj inter la du ŝtatoj.

IBAN: SK7283300000002600820124
SWIFT/BIC: FIOZSKBAXXX

# Esperantisto Slovaka

Organo de Slovakia Esperanta Federacio
*Orgán Slovenskej esperantskej federácie*

Fondita en 1946 de Ernesto Váňa
*Založený v roku 1946 Ernestom Váňom*

Aperas 4-foje jare / *Vychádza 4x do roka*

N-ro 3/2015, ISSN 1335-5031

**Adreso de la redakcio / *Adresa redakcie:***
Pavol Petrík, Na Dujave 3,
SK-082 56 Pečovská Nová Ves
*esperantistoslovaka@gmail.com*

**Abonkotizo / *Predplatné***
Libervola, sed minimume 6 EUR
(la SKEF-membroj havas rabaton de 2 €)
*Dobrovoľné, minimálne však 6 EUR (členovia SKEF majú zľavu 2 €)*

Abonkotizo al eksterlando: min. 10 €
*Predplatné do cudziny: min. 10 €.*

La membro- kaj abon-kotizo de SKEF, kun nur elektronika versio: minimume 5 €
*Členstvo v SKEF a predplatné len elektronickej verzie časopisu: min. 5 €*

La abon- kaj membro-kotizon eblas transpagi al banka konto, resp. pagi kontante ĉe giĉeto de loka Tatrabanka al la konto de SKEF: 302 137 0653/1100, aŭ al la **UEA-konto skef-i**.
*Členské a predplatné môžete zaplatiť prevodom, resp. zaplatením čiastky v hotovosti v miestnej Tatrabanke na účet SKEF: 302 137 0653/1100, alebo na UEA-konto skef-i.*

**Post la pago nepre skribu al *jarmilarech@azet*.sk aŭ telefonu (SMS) al 0907184669, kiam kaj kiamaniere vi pagis (ekz. banknumero).**
***Po zaplatení určite oznámte mailom alebo telefonicky, kedy a akým spôsobom (napr. číslo účtu) ste poukázali platbu.***

**Adreso de Slovakia Esperanta Federacio**
***Adresa Slovenskej esperantskej federácie:***
Zvolenská 15/21, SK-036 01 Martin, Slovakio

Prezidanto / *predseda*: Stano Marček, stano.marcek@gmail.com
Vicprezidanto / *podpredseda*: Michal Matúšov (KuboF), michal.matusov@esperanto.sk
Kasisto / *Pokladník*: Jarmila Rechtorisová, jarmilarech@azet.sk, tel. 0907184669.

# La deka kaj la lasta* SES

**Inter la 11-a kaj la 19-a de julio en la slovaka urbo Martin okazis la jubilea deka Somera Esperanto-Studado. Partoprenis ĝin 190 homoj el 27 landoj, kiuj venis lerni aŭ plibonigi sian konon de la Lingvo Internacia.**

La ĉefa celo de SES estas instrui Esperanton sur diversaj niveloj – ekde plenaj komencantoj, kiuj konstruas siajn unuajn frazojn kun Stano Marček aŭ Viktor Sole, ĝis lingvaj spertuloj, kiuj cerbumas pri gramatiko kun Bertilo Wennergren, aŭ ekkonas novajn vortojn kun Konstantin Tiĥomirov. Entute instruis 12 instruistoj de 12 landoj! Krome ĉi-jare, simile kiel pasintjare, okazis ankaŭ literatura kurso, gvidata de Russ Williams kaj Nicola Ruggiero.

# *Desiate a posledné* SES*

***Medzi 11. a 19. júlom sa v slovenskom meste Martin uskutočnilo jubilejné desiate Letné esperantské štúdium. Zúčastnilo sa ho 190 ľudí z 27 krajín, ktorí sa prišli učiť alebo zlepšiť svoje znalosti mdzinárodného jazyka.***

*Hlavným cieľom SES-u je vyučovať esperanto na rôznych úrovniach – od úplných začiatočníkov, ktorí zostavujú svoje prvé vety so Stanom Marčekom a Viktorom Sole, až po jazykovo skúsených, ktorí sa zamýšľajú nad gramatikou s Bertilom Wennergrenom, alebo spoznávajú nové slová s Konštantinom Tichomirovom. Spolu vyučovalo 12 učiteľov z 12-ich krajín! Okrem toho sa, podobne ako vlani, uskutočnil literárny kurz, vedený Russom Wiliamsom a Nikolom Ruggierom.*



**Petro Baláž prezentas la instruistojn dum la inaŭguro. Foto: Aleksej Ogurtsov**

Sed SES ofertis ne nur antaŭtagmezan lingvolernadon. La programo estis sufiĉe riĉa kaj ĉiuj povis trovi por si ion interesan. Vojaĝemuloj povis viziti famajn slovakajn urbojn, kastelojn, bestoĝardenon aŭ montaron Altaj Tatroj. Scivolemuloj povis partopreni interesajn posttagmezajn prelegojn. Temoj de programeroj estis buntaj – kursetoj de diversaj lingvoj, diskutrondoj pri vivstiloj kaj socisistemoj, manartaĵoj, movadprelegoj kaj danckursoj. Dancemuloj esprimis sin ankaŭ dum vesperaj koncertoj, interalie de Asorti kaj Kaŝi. Sportemuloj havis ŝancon gajni en speciale preparitaj konkursoj dum sporta tago, aŭ ludi simple por plezuro dum la tuta semajno. Frandemuloj esploris gustojn de la tuta mondo dum Internacia Kuirarta Festivalo. Noktemuloj serĉis homlupojn dum Homlupaj Noktoj. Diboĉemuloj kiel kutime povis lasi monon en la drinkejo :)

Omaĝe al dekjariĝo de la aranĝo Marek Blahuš proponis kvizon pri SES kun valoraj premioj. Ni festis ankaŭ per kuko kaj medogustumado. Krome dum la lasta vespero okazis aŭkcio de bela pentrajo

*SES však neponúkalo len dopoludňajšie vyučovanie. Program bol dosť bohatý a všetci si mohli nájsť niečo zaujímavé. Tí, čo radi cestujú, mohli navštíviť známe slovenské mestá, zámky, zoologické záhrady alebo Vysoké Tatry. Ľudia bažiaci po vedomostiach sa mohli zúčastniť popoludňajších prednášok. Témy boli pestré – kurzy rôznych jazykov, diskusné krúžky o životných štýloch a sociálnych systémoch, ručné práce, prednášky o našom hnutí a tanečné kurzy. Tanečníci si prišli na svoje aj počas večerných koncertov, medzi inými Asorti a Kaši. Milovníci športu mali šancu vyhrať v špeciálne pripravených súťažiach počas športového dňa, alebo si zahrať jednoducho pre potešenie počas celého týždňa. Maškrtníci skúmali chute z celého sveta počas Medzinárodného festivalu kuchárskeho umenia. Ponocní hľadali vlkočloveka počas vlkočlovečích nocí. Pijani mohli ako vždy nechať peniaze v krčme :-)*

*Na počesť desiatych narodenín podujatia Marek Blahuš navrhol kvíz s hodnotnými cenami. Slávili sme aj koláčmi a ochutnávkou medoviny. Okrem toho sa posledný večer*



Komuna foto apud Štrbské pleso



kun montara pejzaĝo de Martin, kiun faris ĝuste dum SES unu el la partoprenantoj. La bildon sukcese aŭkciis post sufiĉe longa batalo Dorota Rodzianko, kiu volis konservi ĝin kiel belan memoraĵon pri la jubilea SES.

**SES 2015 estis la lasta SES antaŭ Universala Kongreso en 2016 en Nitra, pro kiu SES ne okazos en la sekva jaro. Tamen mi esperas, ke organizantoj, ripozintaj post grandega laboro dum la UK, denove invitos nin al SES en la jaro 2017 kaj la postaj.*

**Anna Liszewska**
E@I-volontulino

# La aliaj ne estas strangaj kaj mi ne estas normala

**Dum la lastaj dudek kvar jaroj de mia vivo mi trairis diversajn periodojn, kaj kiam mi forlasis lernejon kun la scio, ke komenciĝas mia vivo de ordinara plenkreskulo, mi akceptis mian sorton de malrapide blindiĝanta informadikisto.**

*uskutočnila aukcia pekného obrazu hornatej krajinky Martina, ktorý namaľoval jeden z účastníkov. Získala ho po dosť dlhom boji Dorota Rodzianko, ktorá si ho chcela ponechať ako pamiatku na jubilejné SES.*

*SES 2015 bolo posledné pred Svetovým kongresom esperanta v roku 2016 v Nitre, preto sa budúci rok neuskutoční. Dúfam však, že organizátori, keď si oddýchnu po ohromnej práci, nás znovu pozvú na SES v roku 2017 a ďalších.

***Anna Liszewska***
*E@I-dobrovoľníčka*

# *Okolie nie je čudné a ja nie som normálny*

***Uplynulých dvadsaťštyri rokov môjho života som stihol prejsť viacerými obdobiami a v čase odchodu zo školy s vedomím, že mi začína život bežného dospeláka, som sa zmieril so svojim osudom pomaly slepnúceho a priberajúceho programátora.***



Ekskursantoj en Altaj Tatroj


La komencantoj ĉe Stano Marček


Akcepteja laboro


Prelego de Vašek Zouzalík pri la ĉeĥa lingvo


Instruado de desegnado

Ie en mia subkonscio tamen silente dormetis la espero, ke eble mi mian tutan surteran vivon ne pasigos per tuttaga sidado en la oficejo. Verdire, tiu imago de ĉiutaga rutino timigadis min.

Kiam miaj someraj planoj subite disfalis, mi dum iom da tempo batalis kun propra egoo, provadis postlasi la triston, malkontenton kaj propran intereson. Mi bezonis ion, pri kio mi povus tuj entuziasmiĝi, simple ion, kio anstataŭigus en mia kapo la malagrablajn sentojn pri la proksimiĝanta somero, kiu plej supozinde devintus iĝi la plej enua en la lasta kvaronjarcento. La ideo komuniki kun homoj sen iaj ajn baroj tra la tuta mondo fascinis min jam antaŭ longe. Unu baro, la distanco, estis superita jam antaŭ longe. Restis nur la lingva problemo, kies solvo estis proponita longe antaŭ ni. Unu lingvo por ĉiuj – jes, estas Esperanto. Mi sciis pri ĝi jam antaŭ longe, sed mi neniam igis min provi ĝin kompreni.

La interreto estas senfina, kaj mi kredis, ke ĝi ofertos al mi eblon de ŝanĝo, sencohavan tempopasigon ekster laborejo, dum ferioj. Mi ne memoras, kion precize mi serĉis kaj kion mi sekvis, sed mi malkovris unu baldaŭ okazantan aranĝon, kiu devintus esti proksime de mi, kun homoj de la tuta mondo, ofertante la eblon akiri la konon de Esperanto. Mi ne sciis, kion atendi, mi nur sciis, ke mi irus sole. Kaj mi sciis, ke devas esti tiel, kaj ke la aliĝilo estos plenigita ene de dekoj

*Niekde v podvedomí však tíško driemala nádej, že možno nestrávim svoj pozemský pobyt celodenným sedením v kancelárii. Popravde, táto predstava každodennej rutiny ma desila.*

*Keď mi tento rok zo dňa na deň padli plány na leto, chvíľu som bojoval s vlastným egom, akokoľvek som sa snažil za hlavu zahodiť svoj smútok, nespokojnosť a vlastný záujem. Potreboval som niečo, pre čo sa môžem v momente nadchnúť, jednoducho niečo, čo by mi v hlave nahradilo tie nepríjemné pocity z prichádzajúceho leta, ktoré malo slušné predpoklady na to, aby sa stalo najnudnejším za posledné štvrťstoročie. Myšlienka možnosti komunikovať s ľuďmi bez akýchkoľvek bariér po celom svete ma fascinovala už dávno. Jedna prekážka, ktorou je vzdialenosť, bola prekonaná už dávno. Ostal už len jazykový problém, ktorého riešenie bolo navrhnuté dávno pred nami. Jeden jazyk pre všetkých — áno, je to esperanto. Vedel som o ňom už dávno, ale nedokopal som sa k tomu, aby som sa ho pokúsil pochopiť.*

*Internet je nekonečný a veril som, že mi ponúkne možnosť zmeny, možnosť zmysluplného strávenia času mimo práce, počas dovolenky. Nespomínam si, čo presne som hľadal a za čím som šiel, objavil som však jedno nadchádzajúce podujatie, ktoré sa malo konať neďaleko odo mňa, s ľuďmi z celého sveta, ponúkajúce možnosť nadobudnutia znalostí esperanta.*


Membroj de la E-klubo „E-mental“


Szabi el Hungario instruas


(Ne) nur serioza instruado :)


Taskofolioj por diligentaj lernantoj


Kaŝi el Germanio kun Tabea dum koncerto


Koncerto dum la Internacia vespero


Klaso de Nina el Pollando


Klaso de Peter Weide el Germanio/Danio


Tim el Britio kun siaj studentoj


Gražina el Litovio dum instruado


Ludoj abundis dum SES


Teama laboro en klas-ĉambro

da sekundoj, kaj ekde la unua sekundo mi sentis, ke mi ĝin trovis. Mi aliris la aferon tiel, ke mi lernos ion novan, eble mi kun iu babilos, kaj se mi enuos, mi iros hejmen, aŭ bierumi kun amikoj.

Mi gigante eraris. Gigante mi eraris mian tutan vivon pri tiom da aferoj! La Somera Esperanto-Studado – SES 2015 en Martin, estis tutcerte la plej bone pasigita semajno en mia vivo. Ĝi sonas kvazaŭ eltondita el septembra lerneja verkaĵo pri la lasta ferio. Estu tiel. Post kiam grupeto da homoj helpis al mi superi miajn introvertulajn komunikajn barierojn, nekredebla kvanto da aferoj ekokazis. Mi neniam antaŭe trovis min en tiel inspira medio. Mi neniam komprenis pasion de kelkaj homoj pri trovado de novaj konatuloj, ĉefe dum tiaj ĉi aranĝoj. Ja kiel utilas al mi amiko por unu semajno? Dio mia, mi meritus vangofrapon. Kaj ne nur unu. Oni diras, ke kio okazas en Esperantujo, restas en

*Nevedel som, do čoho by som šiel, vedel som akurát to, že by som šiel sám. A vedel som, že to tak má byť, vedel som, že registračný online formulár bude vyplnený v priebehu desiatok sekúnd, od prvej sekundy som tušil, že som to našiel. Bral som to tak, že sa naučím niečo nové, možno si s niekým pokecám a keď sa budem nudiť, tak odbehnem domov, alebo s kamošmi na pivo.*

*Kolosálne som sa mýlil. Kolosálne som sa mýlil celý svoj život v toľkých veciach! Letná škola esperanta – SES 2015 v Martine bol suverénne najlepšie strávený týždeň môjho života. Znie to, ako keby to bolo vystrihnuté zo septembrovej slohovej práce gymnazistu o posledných prázdninách. A nech. Po tom, čo mi skupinka ľudí pomohla prekonať moje introvertné komunikačné bariéry, sa začalo diať neuveriteľné množstvo vecí. Ešte nikdy som sa neocitol v tak inšpiratívnom prostredí. Nikdy som nechápal záľubu niektorých ľudí*



„Kiu lernilo ankoraŭ mankas al mi?“



Programtabulo – elekto de programero


Filmado por reklami UK-on


SKEJ revigliĝas kaj aktivas


Belulinoj dum mielgustumado


Bertilo Wennergren (DE/SE) kun siaj lernantoj


La popola muzik-enseblo de Peter Sarnovský


La ensemblo Asorti el Litovio


La libroservo



Esperantujo, pro tio mi faru nur etan resumon, kaj mi komencu per la malplej grava fakto.

Mi lernis iom da Esperanto. Strange, ĉu ne? Kaj mi prenis ĝin kiel prioritaton, kiel celon. Nu, estas nur ilo. Ĉirkaŭ Esperanto ekzistas mojosa komunumo. Komunumo de homoj el diversaj medioj, kun diversaj spertoj, travivaĵoj, kiuj verŝajne movis min antaŭen en mia vivo pli ol se mi legus tutan bibliotekon plenan je verkoj de ĉiuj diversaj ĝenroj. Tion ĉi verkas la vivo mem. Malfermiĝis miaj okuloj, mi laboras pri tio, ke la klapoj sur ili forbrulu en pasinteco, mi komprenis, ke la mondo sen antaŭjuĝoj estas io, al kio devus ĉiuj kontribui. Mi konsciiĝis, ke eĉ se laŭ la identigilo mi ne plu junas, mi daŭre junas ĝuste tiom, kiom mi volas, kaj plej grave – tiel kiel mi stulte al multaj junuloj enviis iliajn eblecojn, mia pordo nun malfermiĝis kaj la tempo de juneco komenciĝis ĝuste nun!

Iom da ordinaraj vortoj fine. Mi volas doni al Esperantujo tion, kion ĝi jam sukcesis oferti al mi ene de tiuj kelkaj tagoj. Mi antaŭĝojas la kunlaboron kun la Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ), mi ĝojas, ke esperantistaj okazaĵoj estas ĉie en la mondo, kaj estas granda ŝanco, ke la homojn, kiujn mi nun renkontis, mi baldaŭ renkontos denove.

Mi kredas, ke kiel muzikisto mi povos iomete kontribui al la programo de la venontjara kongreso. Cetere, la Universala Kongreso, kaj denove en Slovakio. Mojose, ĉu ne? ☺

Tamen ekzistas du aferoj, kiujn mi ŝanĝus. Estus bonege, se ne ekzistus la postkongresa sindromo de esperantistoj, ĝi vere dolorigas. Kaj oni devus ion fari pri la tempo de matenmanĝoj, estas neeble trafi ilin. ☺

**Peter Drábik**

*v nadväzovaní nových známostí, hlavne na takýchto akciách. Veď na čo mi je preboha kamarát na týždeň? Kristepane, facku by som si zaslúžil. A nie jednu. Vraví sa, že čo sa stane v Esperantsku, aj v ňom ostane, dovolím si preto iba malé zhrnutie a začnem najmenej podstatnou vecou.*

*Naučil som sa niečo z esperanta. Zvláštne, že? A bral som to ako prioritu, účel, cieľ. Nuž, je to len prostriedok. Okolo esperanta jestvuje úžasná komunita. Komunita ľudí z rôznych prostredí, s rôznymi skúsenosťami, zážitkami, ktorá ma v živote zrejme posunula viac, ako keby som prečítal celú knižnicu s dielami najrozmanitejších žánrov. Toto píše sám život. Otvorili sa mi oči, pracujem na tom, aby klapky na nich zhoreli v minulosti, pochopil som, že svet bez predsudkov je niečo, k čomu by mal každý prispieť, uvedomil som si, že aj keď podľa občianskeho preukazu už nie som „teen“, že som stále taký mladý, ako chcem ja, a to najdôležitejšie – tak, ako som množstvu mladých ľudí hlúpo závidel ich možnosti, tak sa mi teraz otvorili dvere a pre mňa „teen age“ práve začal!*

*Pár obyčajných slov na záver. Chcem Esperantsku dať to, čo mi stihlo za pár dní ponúknuť. Teším sa na spoluprácu so Slovenskou esperantskou mládežou (SKEJ), teším sa z toho, že esperantské udalosti sú po celom svete a je vysoká šanca, že ľudí, ktorých som spoznal teraz, zanedlho uvidím znova. Verím, že ako hudobník budem môcť svojou troškou prispieť k programu budúcoročného kongresu. Ináč, celosvetové podujatie a opäť na Slovensku, no nie je to skvelé?* ☺

*Nájdu sa ale dve veci, ktoré by som zmenil. Bolo by fajn, keby neexistoval pokongresový syndróm esperantistu, fakt to bolí. A niečo treba urobiť s časom raňajok, je nemožné ich stíhať.* ☺ **Peter Drábik**


Kurso de drumado kun Gabo


Organizantoj sursceneje – adiaŭa vespero


Publiko dum la adiaŭa vespero


Tabea kun sia patrino dumkoncerte



La kongresejo Lille Grand Palais



Bonvenigo en la enirhalo



La solena malfermo



# Informoj pri la 100-a UK en Lillo, Francio

**La jubilea 100-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Lillo 26.7. – 1. 8. 2015, simbole en la nordokcidenta regiono de Francio, kiel antaŭ 100 jaroj en Bulonjo sur Maro en julio 1905, kie okazis la 1-a Universala Kongreso de Esperanto, en kiu por la unua fojo aŭdiĝis la parolata Esperanto.**

Ankaŭ pro tio Frederic Cuvillier, la eksa ministro, deputito kaj urbestro de la urbo Boulogne sur Mer, aŭspiciis la jubilean Universalan Kongreson de Esperanto, kaj dum la solena malfermo li salutis la 2698 partoprenantojn el 82 landoj. La partoprenantojn salutis ankaŭ Prof. Ludoviko Zaleski-Zamenhof (90), nepo de Ludoviko Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, vivanta en Parizo. Li memorigis, ke dum 110 jaroj, kiuj pasis ekde la 1-a Universala kongreso de Esperanto, okazis du grandaj tragedioj – mondmilitoj, en kiuj mortis dekoj da miloj de homoj. Esperanto estas portanto de la ideoj de paco, kaj ĝiaj uzantoj strebas konstrui kaj plifortigi la pacon, interkompreniĝon inter homoj de diversaj naciecoj kaj etnoj en la mondo.

La kongreso estis festivalo de prezentado de riĉa Esperanto-kulturo, dediĉita al la temo “Lingvoj, arto kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj.” La kontribuaĵoj de la partoprenantoj kaj diskutoj pri la kongresa temo kontribuis al la disvolviĝo de la internacia jardeko de Unesko por pliproksimiĝo de kulturoj (2013-2022). Ĝenerale dum ĉi tiuj deklaroj oni pensas pri renkontiĝoj de ministroj, kulturaj festivaloj, interŝtataj kontraktoj, tiel nomata “dialogo inter elitoj.” Por homoj uzantaj Esperanton dialogo signifas homan dimension kaj ĉiutagan aferon, kiuj konfirmas la viveblecon de egala homa interetna dialogo.

# *Informácia zo 100. UK v Lille, Francúzsko*

***Jubilejný 100. svetový kongres Esperanta sa uskutočnil v Lille 26.7. – 1.8.2015, symbolicky v severozápadnom regióne Francúzska, ako pred 110 rokmi v Boulogne sur Mer v júli 1905, kde sa uskutočnil 1. svetový kongres Esperanta, na ktorom po prvýkrát zaznelo hovorené Esperanto.***

*Aj z toho dôvodu Fréderic Cuvillier, bývalý minister, poslanec a primátor mesta Boulogne sur Mer, prevzal záštitu nad jubilejným svetovým kongresom Esperanta a pozdravil na slávnostnom otvorení kongresu 2698 účastníkov z 82 krajín. Účastníkov pozdravil aj Prof. Ludwik Zaleski-Zamenhof (90), vnuk Ludovika Zamenhofa, iniciátora Esperanta, žijúci v Paríži. Pripomenul, že v priebehu 110 rokov, ktoré uplynuli od 1. svetového kongresu Esperanta, sa stali dve veľké tragédie – svetové vojny, v ktorých zahynuli desiatky miliónov ľudí. Esperanto je nositeľom myšlienok mieru a jeho používatelia sa usilujú o budovanie a posilňovanie mieru, vzájomného porozumenia medzi ľuďmi rôznych národností a etník vo svete.*

*Kongres bol festivalom prezentácie bohatej esperantskej kultúry, venovaný téme „Jazyky, umenie a hodnoty v dialógu medzi kultúrami“. Vystúpenia účastníkov a diskusie ku kongresovej téme boli príspevkom k rozvoju medzinárodného desaťročia UNESCO pre zbližovanie kultúr (2013 – 2022). Vo všeobecnosti sa pri takýchto vyhláseniach myslí na stretnutia ministrov, kultúrne festivaly, medzištátne zmluvy, tzv. „dialóg medzi elitami“. Pre ľudí používajúcich Esperanto dialóg znamená ľudský rozmer a každodennú záležitosť, ktoré potvrdzujú životaschopnosť rovnoprávneho ľudského medzietnického dialógu.*





La halo Mihaux kun ekspozicioj


Kongresanoj el Slovakio


Slovaka delegacio dum la UK (maldekstre la urbestro de Nitra J.Dvonč)



Jozef Reinvart prelegas pri fakaj aranĝoj dum la 101-a UK en Slovakio



Stano Marček transprenas la premion Cigno, atribuitan al SKEF



La koncerta programo estis vere riĉega




La kongreso inkludis ankaŭ la 68-an Internacian Kongresan Universitaton, kie profesoroj kaj akademianoj de universitatoj el Brazilo, Ĉeĥio, Ĉinio, Finnlando, Francio, Israelo, Germanio, Rusio, Hispanio, Italio kaj Usono pridiskutis rilatajn temojn el diversaj sciencaj fakoj en la kunteksto de la heredaĵo de Ludoviko Zamenhof. Ili volis ne nur pritaksi la nunan situacion, sed proponi ankaŭ iujn prognozajn elirpunktojn.

Dum la kongreso okazis multaj lingvaj, fakaj, edukaj aranĝoj kaj kunsidoj de la centraj organoj de Universala Esperanto-Asocio, Eŭropa Esperanto-Unio kaj aliaj regionaj grupoj kaj naciaj asocioj, fakaj, kultur-sociaj, junularaj, religiaj kaj politikaj interes-organizaĵoj kaj asocioj. Granda spaco estis dediĉita al kulturo: novkreitajn spektakloj, koncertoj de klasika kaj moderna muziko. Estis prezentita granda paletro de literatura kaj aŭd-vida verkado (eduka, origina kaj tradukita literaturo), kiu dokumentas riĉecon de lingvaj esprimilojn de Esperanto.

La partoprenantoj de la Universala Kongreso en la akceptita rezolucio emfazis, ke la evoluo de la interkultura dialogo estas same urĝa hodiaŭ, kiel ĝi estis antaŭ 110 jaroj. La lingva komunikado devus esti ne nur afero de la cerbo, sed ankaŭ de la koro. Al la vera interkompreniĝo de homoj de diversaj naciecoj konduas nur dialogo, kiu kunligas kapablojn, arton kaj amikecon. Ĝuste tian interkulturan dialogon aplikas kaj evoluigas la Esperanto-movado jam 128 jarojn. La Esperanto-movado koncentriĝas al evoluo kaj disvastigo de la valoroj de respekto, paco kaj justeco inter ĉiuj homoj, konforme al la celoj de Unesko kaj rilate al la strebo de UNO por konstruo de la daŭre konservebla tutmonda socio. La kongresoj rekomendis al aktivuloj kaj movadoj subtenantaj interkulturan dialogon dediĉi pli da atento al la lingva dimensio surbaze de justa kaj kunliga lingvo, kies uzado povas plifaciligi kaj profundigi la interkulturan dialogon.

La 100-a UK inkludis ankaŭ prezentadon de Slovakio kiel la venonta gastiganta lando. Surbaze de la decido de UEA la 101-a Universala kongreso de Esperanto okazos en Nitra 23.-30.7.2016, kiam Slovakio prezidos en la Konsilantaro de EU.



*Súčasťou kongresu bola aj v poradí už 68. medzinárodná kongresová univerzita, na ktorej sa profesori a akademickí pracovníci univerzít z Brazílie, Česka, Číny, Fínska, Francúzska, Izraela, Nemecka, Ruska, Španielska, Talianska a USA zaoberali v kontexte odkazu Ludovika Zamenhofa súvisiacimi témami z rôznych vedeckých oblastí, s cieľom nielen hodnotiť súčasný stav, ale načrtnúť aj isté prognostické východiská.*

*Počas kongresu sa uskutočnil celý rad jazykových, odborných, vzdelávacích podujatí a zasadnutí ústredných orgánov Svetovej esperantskej asociácie, Európskej esperantskej únie, ako aj ďalších regionálnych zoskupení a národných zväzov, odborných, kultúrno-spoločenských, mládežníckych, náboženských a politických záujmových organizácií a združení. Značný priestor bol venovaný kultúre: novonaštudovaným divadelným predstaveniam, koncertom vážnej a modernej hudby. Prezentovaná bola široká paleta knižnej a audiovizuálnej tvorby (vzdelávacej, originálnej a prekladovej literatúry), dokumentujúca bohatosť jazykových výrazových prostriedkov Esperanta.*

*Účastníci svetového kongresu v prijatej rezolúcii zdôraznili, že rozvoj medzikultúrneho dialógu je rovnako naliehavý dnes, ako bol pred 110 rokmi. Jazyková komunikácia by mala byť záležitosťou nielen rozumu, ale aj srdca. Ku skutočnému porozumeniu ľudí rôznych národností vedie iba dialóg spájajúci zručnosti, umenie a priateľstvo. Práve takýto medzikultúrny dialóg uplatňuje a rozvíja v praxi esperantské hnutie už 128 rokov. Esperantské hnutie sa zameriava na rozvíjanie a šírenie hodnôt vzájomného rešpektu, mieru a spravodlivosti medzi všetkými ľuďmi, v súlade s cieľmi UNESCO a v spojení so súčasným úsilím OSN pre budovanie trvalo udržateľnej svetovej spoločnosti. Aktivistom a hnutiam podporujúcim medzikultúrny dialóg účastníci kongresu odporučili venovať viac pozornosti jazykovému rozmeru na základe spravodlivého a spájajúceho jazyka, ktorého použitie môže uľahčiť a prehĺbiť medzikultúrny dialóg.*

*100. svetový kongres Esperanta sa niesol v znamení prezentácie Slovenska, ako budúcej hostiteľskej krajiny. Na základe rozhodnutia*




Antaŭ la kongresejo ĉiam estis vigle



La kongresanoj apud la monumento de Zamenhof en Bulonjo ĉe maro





Infanoj de IIK dum la solena fermo



Antaŭkongreseja koncerto
de Asorti el Litovio




Politikaj diskutoj
de la E-movadanoj




Dum la tuta semajno Slovakio havis informstandon en la kongresejo. Ĝi estis preparita kunlabore kun Slovaka agentejo por turismo (SACR), la urbo Nitra, Slovakia Esperanto-Federacio, civitana asocio Edukado@Interreto kaj aliaj institucioj. En la stando haveblis diversaj informmaterialoj pri Slovakio, Nitra, la kongreso kaj akompantaj aranĝoj, diversaj reklam-materialoj (ekzemple Slovaka ĉokolado Lyra, kiu venkis en la monda konkurso de ĉokoladoj en la jaro 2014). Multaj partoprenantoj en Lillo aliĝis al la Universala Kongreso en Nitra.

La slovakan delegitaron en la Universala kongreso en Lille gvidis Jozef Dvonč, la urbestro de Nitra. Dum la solena malfermo la 26-an de julio 2015 Slovakion reprezentis Alain Bar, la honora konsulo de Slovakio en Lillo. En la antaŭlasta tago de la kongreso, la 31-an de julio 2015, okazis unuhora prezentado de Slovakio kaj Nitra. Partoprenis ĝin reprezentanto de la ambasadoro de Slovakio en Francio Daniel Jurkovič, la direktoro de Slovaka instituto en Parizo, kaj Alain Bar, la honora konsulo de Slovakio en Lillo. Komence de la prezentado la urbestro de Nitra salutis la kongresanojn en Lille kaj invitis ilin por la venonta jaro al Slovakio kaj la historia Nitra. Sekve Peter Baláž, la prezidanto de LKK en Nitra, informis la kongresanojn, ke la prezidento de Slovakio Andrej Kiska aŭspicias la kongreson kaj Slovaka Poŝto eldonos du poŝtmarkojn en la jaro 2016 okaze de la unua prezidantco de Slovakio en la Konsilantaro de EU kaj la unua Universala kongreso en Slovakio. La video-prezentaĵo atentigis la partoprenantojn pri la interesaĵoj de Slovakio, la regiono kaj la urbo Nitra, kaj akompantanaj aranĝoj por fakuloj kaj la ĝenerala publiko.

Jozef Reinvart, la sekretario de LKK por eksterlandaj, diplomataj kaj fakaj rilatoj, kontaktpersono de Ministerio de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovaka Respubliko, kune kun la LKK por la 101-a Universala kongreso de Esperanto, informis pri tri akompanaj fakaj aranĝoj, per kiuj la Esperanto-movado malfermiĝos por la unua fojo en historio al la ĝenerala publiko. Temas pri Lingva kaj Politika Konferenco de landoj de V4+ „Perspektivoj

*Svetovej esperantskej asociácie o konaní 101. kongresu esperanta v Nitre 23. – 30.7.2016, keď bude Slovensko predsedať v Rade EÚ.*

*Počas celého týždňa malo Slovensko v kongresovom paláci informačný stánok, ktorý bol pripravený v spolupráci so Slovenskou agentúrou pre cestovný ruch (SACR), Mestom Nitra, Slovenskou esperantskou federáciou, občianskym združením Edukácia@Internet a ďalšími inštitúciami. V stánku boli k dispozícii rôzne informačné materiály o Slovensku, Nitre, pripravovanom kongrese a sprievodných podujatiach, rôzne reklamné materiály (napríklad aj slovenská čokoláda Lýra, ktorá zvíťazila na svetovej súťaži čokolád v roku 2014). Veľa účastníkov vyplnilo už v Lille prihlášky na svetový kongres v Nitre.*

*Slovenskú delegáciu na Kongrese Esperanta v Lille viedol Jozef Dvonč, primátor Nitry. Na slávnostnom otvorení 26.7.2015 Slovensko zastupoval Alain Bar, honorárny konzul Slovenska v Lille. V predposledný deň kongresu 31.7.2015 sa uskutočnila hodinová prezentácia Slovenska a Nitry, ktorej sa zúčastnil v zastúpení veľvyslanca SR vo Francúzsku Daniel Jurkovič, riaditeľ Slovenského inštitútu v Paríži a Alain Bar, honorárny konzul Slovenska v Lille. Na úvod prezentácie primátor Nitry pozdravil účastníkov kongresu v Lille a pozval ich na budúci rok na Slovensko a do historickej Nitry. Následne Peter Baláž, predseda organizačného výboru Kongresu v Nitre, informoval účastníkov, že nad kongresom prevzal záštitu Andrej Kiska, prezident SR, a Slovenská pošta vydá v roku 2016 dve známky, pri príležitosti prvého predsedníctva Slovenska v Rade EÚ a prvého svetového kongresu Esperanta na Slovensku. Prezentačné video upriamilo pozornosť účastníkov na zaujímavosti Slovenska, regiónu a mesta Nitra a na pripravované sprievodné podujatia pre odbornú i širokú verejnosť.*

*Jozef Reinvart, tajomník organizačného výboru pre zahraničné, diplomatické a odborné vzťahy, kontaktná osoba MZVaEZ SR s organizačným výborom pre prípravu 101. svetového kongresu Esperanta, informoval o troch sprievodných odborných podujatiach, ktorými sa začne esperantské hnutie po prvýkrát v histórii otvárať širokej svetovej verejnosti.*



Slovakio transprenas la kongresan flagon
dum la ferma ceremonio




FEL kaj
Monato
reklamas
sian agadon



Eldonaĵoj
de S.Marček
ankaŭ estis
prezentitaj




Movada foiro
allogis multajn
vizitantojn


Katalin Kováts klarigas pri edukado.net



Knaboj de Orienta Timoro (lernintoj de SES)



Pli ol 100 Esperantaj asocioj, eldonejoj kaj instancoj aliĝis al la sabata Movada Foiro




de la lingva politiko en EU," kiun por la unua fojo partoprenos politikistoj, lingvaj fakuloj kaj reprezentatoj de civitanoj kaj „Internacia Entreprenista kaj Komerca Forumo", aŭspiciata de Miroslav Lajčák, la vicprezidanto de la registaro kaj ministro de eksterlandaj kaj eŭropaj aferoj de Slovaka respubliko. La tria aranĝo estos „Interreligia Renkontiĝo de la Reprezentantoj de Diversaj religioj," kiu estos grava kontribuaĵo dum la prezidanteco de Slovaka Respubliko en la Konsilantaro de EU en la tempo de la kreskanta interetna, interkultura kaj interreligia streĉo, konfliktoj igantaj ksenofobion, ekstremismom, rifuzon kaj timon de la civitanoj de EU sub la influo de la nekontrolita alveno de granda nombro de nelegalaj enmigrintoj.

La prezentado de slovaka delegitaro estis buntigita per la kontribuaĵo de popolartisto, sendita per la agentejo SACR. Li ludis fujaron kaj prezentis popolajn kantoj kaj aliajn muzik-instrumentojn ĉe la slovaka stando.

Fine de la Universala Kongreso la 1-an de aŭgusto 2015 tri slovakaj reprezentantoj alparolis la kongresanojn en Esperanto. Stanislav Vallo, la ambasadoro de Slovakio en Bruselo, invitis la kongresanojn por la venonta jaro al Nitra kaj al Slovakio, kiam nia lando prezidos en la Konsilantaro de EU. Jozef Dvonč, la urbestro de Nitra, informis la kongresanojn pri la preparlaboroj por la tutmonda renkontiĝo de esperantistoj, kaj invitis ilin viziti la historian urbon Nitra, kiu estas lulilo de slava kristanismo. Peter Baláž, la prezidanto de LKK de la 101-a UK, invitis la partoprenantoj al la historie unua UK en Slovakio, per kiu komenciĝas ne nur la nova jarcento de Universalaj Kongresoj, sed ankaŭ malfermiĝo de la Esperanto-movado al la tuta mondo. Sekve la urbestro de Nitra transprenis solene la Esperanto-flagon, kiel reprezentanto de la organizantoj de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto.

La estraro de la Universala Esperanto-Asocio dum la kunsido en Lille pritaksis la kandidatiĝojn de Montrealo kaj Seulo por la organizado de la sekva UK kaj ĝi decidis, ke la 102-a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2017 okazos en Seulo. Koreio, Seulo kaj



*Ide o jazykovo-politickú konferenciu krajín V4+ "Perspektívy jazykovej politiky v EÚ", na ktorej sa po prvýkrát zúčastnia spoločne politici, jazykoví odborníci a predstavitelia občanov a "Medzinárodné podnikateľské a obchodné fórum", nad ktorými prevzal záštitu Miroslav Lajčák, podpredseda vlády a minister ZVaEZ SR. Tretím podujatím bude "Medzinábožné stretnutie predstaviteľov rôznych náboženstiev", ktoré bude významným príspevkom počas predsedníctva SR v Rade EÚ, v čase rastúceho medzietnického, medzikultúrneho a medzináboženského napätia, konfliktov vyvolávajúcich xenofóbiu, extrémizmus, odpor a strach obyvateľstva v EÚ pod vplyvom nekontrolovaného príchodu veľkého počtu nelegálnych prisťahovalcov.*

*Prezentáciu slovenskej delegácie spestrilo vystúpenie ľudového umelca vyslaného agentúrou SACR, ktorý zahral na fujare a pri slovenskom stánku prezentoval ľudové piesne a ďalšie hudobné nástroje.*

*Na záver svetového kongresu 1.8.2015 sa účastníkom prihovorili traja slovenskí predstavitelia v jazyku Esperanto. Stanislav Vallo, veľvyslanec SR z Bruselu, pozval účastníkov na budúci rok do Nitry a na Slovensko, keď bude naša krajina predsedať v Rade EÚ. Jozef Dvonč, primátor Nitry, informoval účastníkov o prípravach na svetové stretnutie esperantistov a pozval ich, aby navštívili historickú Nitru, ktorá je kolískou slovanského kresťanstva. Peter Baláž, predseda organizačného výboru 101. svetového kongresu Esperanta, pozval účastníkov na historicky prvý svetový kongres Esperanta na Slovensko, ktorým sa začína nielen nové storočie svetových kongresov, ale aj otváranie sa esperantského hnutia celému svetu. Následne nato primátor Nitry prevzal slávnostne vlajku Esperanta za organizátorov 101. svetového kongresu Esperanta.*

*Predsedníctvo Svetovej esperantskej asociácie na zasadnutí v Lille pri posudzovaní kandidatúr Montrealu a Soulu na organizovanie ďalšieho svetového kongresu rozhodlo, že sa 102. svetový kongres Esperanta v roku 2017 uskutoční v Soule. Kórea, Soul a organizátori*



IKEF ankaŭ prezentiĝis dum la Movada Foiro


„Marĉekaĵoj" abundis kaj logis atenton


Slovaka budo elstaris dum la Movada Foiro

la organizantoj de la 102a UK povos prezentiĝi dum la 101a UK en Nitra. El la vidpunkto de Slovakio kaj Koreio ĉi tiu decido estas ŝanco por plifortigi, profundigi kaj videbligi tre sukcesan slovakan-korean kunlaboron, kiam Slovakio prezidos en la Konsilantaro de EU.

## Pritakso

La jubilea 100-a kongreso de Esperanto estis festivalo de prezentado de riĉa Esperanto-kulturo, ligita al la temo „Lingvoj, arto kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj.“ La kongreso estis grava kontribuaĵo por la disvolviĝo de Internacia Jardeko de Unesko por pliproksimiĝo de kulturoj (2013-2022). En la akceptita rezolucio la kongresanoj rememorigis la alvokon de Ludoviko Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, dum la 1-a Universala kongreso de Esperanto en Boulogne sur Mer en la jaro 1905, por la subteno kaj evoluigo de la interkultura dialogo inter homoj de diversaj naciecoj kaj etnoj. Lia alvoko estas same urĝa ankaŭ hodiaŭ post 110 jaroj, en la tempo de kreskanta interetna, interkultura kaj interreligia streĉo, konfliktoj, igantaj ksenofobion, ekstremismom, rifuzon kaj timon de la civitanoj de EU sub influo de nekontrolita alveno de granda nombro de nelegalaj enmigrintoj. Aktivuloj kaj movadoj subtenantaj interkulturan dialogon devus dediĉi pli da atento al la lingva dimensio de sia laboro kaj por plifaciligi kaj profundigi la justan kaj egalan interkulturan dialogon ili povus uzi spertojn de la Esperanto-movado, kiu per siaj agado kaj iniciatoj kontribuas al la konstruado kaj plifortigado de la paco, interkompreniĝo inter homoj de diversaj naciecoj kaj etnoj en la mondo.

La slovaka delegitaro en la UK en Lillo, kun grava subteno de SACR kaj la urbo Nitra, sukcese kaj kreeme prezentis Slovakion, la urbon Nitra, preparlaborojn por la 101-a UK kaj la akompanaj fakaj aranĝoj, kiuj okazos 23-30.07.2016 kun la grava politika kaj ŝtata subtenoj en la tempo de la prezidanteco de Slovakio en la Konsilantaro de EU. Tiamaniere oni sukcesis atingi la celon, interesigi la kongresanojn en Lillo pri la venontjara UK en Nitra. La intereso de la kongresanoj en Lillo supozigas, ke la kongreson en Nitra partoprenos pli ol 2 000 partoprenantoj el 70 landoj. Ĝi estos la plej granda aranĝo dum la prezidanteco de Slovakio en la Konsilantaro de EU.

Ĝi estas defio kaj taŭga ŝanco por slovakaj ŝtataj, fakaj institucioj kaj neregistaraj organizaĵoj kontribui kune kun la landoj de V4+ al la preparataj malfermitaj akompanaj fakaj aranĝoj de la UK en Nitra. Per ĉi tiuj internaciaj aranĝoj Slovakio povos doni pozitivan impulson al EU kaj atentigi pri la urĝa bezono komenci solvi la lingvajn kaj kulturajn problemojn en EU. En la kunteksto de la nuna krizo rilate la enmigrintojn estas urĝe, ke EU senprokraste okupiĝu kaj komplekse solvu la kreskantajn interetnajn, interkulturajn kaj interreligiajn streĉojn kaj konfliktojn, kiuj endanĝerigas la unuecon de EU kaj daŭrigon de la eŭropa integriĝo.

**Jozef Reinvart**


**Slovakaj kongresanoj en Lillo kun la prezidanto de UEA Mark Fettes**

*svetového kongresu budú mať príležitosť na prezentáciu počas 101. svetového kongresu v Nitre. Z pohľadu Slovenska a Kórey je toto rozhodnutie príležitosťou ešte viac posilniť, prehĺbiť a zviditeľniť veľmi úspešnú slovensko-kórejskú spoluprácu v čase, kedy bude Slovensko predsedať v Rade EÚ.*

## *Hodnotenie*

*Jubilejný 100. svetový kongres Esperanta bol festivalom prezentácie bohatej esperantskej kultúry, zameraný na tému „Jazyky, umenie a hodnoty v dialógu medzi kultúrami“. Kongres bol významným príspevkom k rozvoju medzinárodného desaťročia UNESCO pre zbližovanie kultúr (2013 – 2022). V prijatej rezolúcii účastníci svetového kongresu pripomenuli výzvu Ludovika Zamenhofa, iniciátora esperanta, na 1. svetovom kongrese esperanta v Boulogne-sur-Merv roku 1905, na podporu a rozvoj medzikultúrneho dialógu medzi ľuďmi rôznych národností a etník. Jeho výzva je rovnako naliehavá aj dnes po 110 rokoch, v čase rastúceho medzietnického, medzikultúrneho a medzináboženského napätia a konfliktov, vyvolávajúcich xenofóbiu, extrémizmus, odpor a strach obyvateľstva v EÚ pred nekontrolovaným príchodom veľkého počtu nelegálnych prisťahovalcov. Aktivisti a hnutia podporujúce medzikultúrny dialóg by mali venovať viac pozornosti jazykovému rozmeru svojej práce a na uľahčenie a prehĺbenie spravodlivého a rovnoprávneho medzikultúrneho dialógu využiť skúsenosti esperantského hnutia, ktoré svojimi aktivitami a iniciatívami prispieva k budovaniu a posilňovaniu mieru, vzájomného porozumenia medzi ľuďmi rôznych národností a etník vo svete.*

*Slovenská delegácia na svetovom kongrese v Lille, s dôležitou podporou SACR a Mesta Nitra, úspešne a inovatívne prezentovala Slovensko, Nitru, prípravu 101. svetového kongresu esperanta, ako aj sprievodné odborné podujatia, ktoré sa s významnou politickou a štátnou podporou uskutočnia 23. – 30.7.2016, v čase Predsedníctva SR v Rade EÚ. Týmto sa podarilo splniť stanovený cieľ– prebudiť medzi účastníkmi kongresu v Lille záujem o budúcoročný svetový kongres v Nitre. Prejavený záujem účastníkov v Lille dáva reálny predpoklad, že sa na kongrese v Nitre zúčastní viac ako 2000 účastníkov zo 70 krajín, ktorý bude najväčším podujatím počas Predsedníctva SR v Rade EÚ.*

*Je to výzva a vhodná príležitosť pre slovenské štátne, odborné inštitúcie a mimovládne organizácie zapojiť sa spolu s krajinami V4+ do pripravovaných otvorených sprievodných odborných podujatí svetového kongresu Esperanta v Nitre. Týmito medzinárodnými podujatiami Slovensko bude mať príležitosť dať pozitívny impulz EÚ a upriamiť jej pozornosť na neodkladnú potrebu začať spoločne riešiť jazykové a kultúrne problémy v EÚ. Z toho dôvodu je v kontexte súčasnej prisťahovaleckej krízy mimoriadne naliehavé, aby sa EÚ začala neodkladne zaoberať a komplexne riešiť rastúce medzietnické, medzikultúrne a medzináboženské napätie a konflikty, ktoré ohrozujú jej súdržnosť a ďalšie pokračovanie európskej integrácie.*

***Jozef Reinvart***

# Instrua UK en Lillo, Francio

**Ĉiu somero en Esperantujo estas fama por multe da renkontiĝoj kaj kongresoj, kiujn vi povas partopreni.**

Tiun ĉi someron mi estis plena de atendoj post SES (Somera Esperanto-Studado) en Martin, kaj mi iris al la Universala Kongreso en Lillo. Mi havis multajn kialojn por iri tien. Unue mi volis ekkoni novan urbon, kaj due, ke tio estis mia unua granda kongreso. Sed la plej grava kialo estis la venonta UK en Nitra en Slovakio. Krom tio ni volis ankaŭ helpi kun la prezentado de nia ne tiel konata lando kaj vidi, kiel funkcias la organizado dum UK, ĉar ĝuste SKEJ strebos por vi organizi neforgeseblan Junularan Programon.

Tuj post la unua tago ni rimarkis, ke la junulara programo en Lillo preskaŭ ne ekzistas, ĉar ĉiutage okazis maksimume 2-3 programeroj, de kiuj unu el ili estis komuna forveturado al junulargastejo. Kompreneble ĉiam vi povas trovi ion, kio estas malbona, kaj tiu ĉi kongreso ne estis escepto. Unu el la pozitivoj estis la aspekto kaj grandeco de la kongresejo. Imponaj salonoj, multe da homoj, ĉio, kio estas bezonata por havi veran, neforgeseblan kongresegon. En Lillo estis ĉio tre multekosta por slovakaj studentoj, ĉar ĉio kostis minimume kvaroble pli ol en Slovakio. Pro granda nombro da ŝteloj en tiu ĉi parto de Francio ni devis esti ĉiam tre atentemaj pri niaj aĵoj (tamen ni estis viktimoj de ŝtelistoj).

Ankaŭ la loĝprezoj kaj ekskursoj estis por ni nepageblaj. Kaj pro tio ni preskaŭ ne havis eblecon partopreni la plej gravan ekskurson al Bulonjo-ĉe-Maro, kie okazis la unua UK en 1905. Ni ankaŭ partoprenis la grandan marŝadon tra la urbo, devualon de la busto de d-ro. L. Zamenhof. Ni eĉ vizitis la urbodomon, kie urbestro regalis nin per manĝajo kaj trinkaĵo.

Kiel ni povis vidi, ne estas simple organizi tiel grandan kongreson por tiom multe da homoj. Mi pensas, ke prezentado de nia UK, kiu okazos en Nitra, estis sukcesa, ĉu en nia budo aŭ dum la lasta tago, kiam ni havis en programo unu horon por oficiale prezenti ĝin. Kun konscio, kion ne fari kaj kion fari pli bone, komenciĝas preparado por la UK en Nitra. Riĉiĝitaj pri gravaj ekkonoj, kion kaj kiel organizi, ni povas komenci kun preparado, kaj ni atendas vin ĉiujn en NITRA!

**Tomáš Stano**




La slovaka stando en la 100-a UK en Lillo

# *Poučný UK v Lille, Francúzsko*

***Každé leto v esperantskom svete je známe tým, že je vždy na výber veľké množstvo podujatí, na ktoré sa môžete vybrať.***

*Toto leto som sa plný očakávaní po týždni v Letnej esperantskej škole v Martine vydal na Celosvetový kongres do Lille. Mal som na to viacero dôvodov. Spoznať nové mesto a zároveň zažiť premiéru na kongrese obdobnej veľkosti. Ale tým hlavným, prečo som tam bol motivovaný ísť, bol budúcoročný celosvetový kongres, ktorý sa uskutoční práve u nás na Slovensku v Nitre. Jednak som chcel pomôcť pri reklamovaní našej krajiny a zaznamenať všetky (ne)dostatky toho francúzskeho, aby sme sa mohli prípadným chybám vyhnúť a pripraviť čo najzaujímavejší mládežnícky program pod hlavičkou SKEJ.*

*Hneď po prvom dni sme zistili, že mládežnícky program v Lille skoro neexistuje, keďže každý deň ho tvorili maximálne dve aktivity. Na tom by nebolo nič zvláštne, keby že však jednou z nich nebol spoločný odchod do ubytovne z kongresovej haly. Samozrejme vždy sa nájde niečo, čo sa dá vytknúť a ani tento kongres nebol žiadnou výnimkou. Najviac ma však v konečnom dôsledku očarili priestory, v ktorých sa kongres konal. Obrovské sály, mnoho ľudí, jednoducho atmosféra pravého kongresu obrích rozmerov. Lille bolo však pre slovenských študentov veľmi drahé, keďže každá vec stála minimálne štyrikrát viac ako na Slovensku. To ešte nehovorím o cenách ubytovania a exkurzií na kongrese. Pre Slovákov niečo nemysliteľné, keďže celodenný výlet do Paríža stál 170 Eur. Rovnako aj neuveriteľné množstvo krádeží, podporované aktuálnymi udalosťami v tejto oblasti, nás neustále držalo v strehu (aj tak nám to nebolo nič platné, keďže niektorí z nás sa stali obeťami krádeží).*

*Nakoľko pre nás boli všetky exkurzie drahé, tak sme sa nemali v pláne zúčastniť žiadnej z nich. Avšak sa nám naskytla príležitosť navštíviť prímorské mesto Boulogne-sur-Mer, kde sa konal 1. celosvetový kongres. Súčasťou výletu bol esperantský manifestačný pochod po meste, odhalenia busty doktora L. Zamenhofa a návšteva radnice mesta, kde nás pohostil sám primátor mesta.*

*Ako sme sa mohli presvedčiť na vlastné oči, zorganizovať kongres pre také množstvo ľudí, bude pre nás veľkou výzvou. Prezentácia toho nášho budúcoročného si myslím, že prebehla úspešne, či už v stánku, alebo v posledný deň, keď na to bola vyčlenená nejaká ta hodinka. Obohatení o dôležité poznatky, čo a ako zorganizovať sa môžeme pustiť do príprav a preto nám všetci držte palce a všetkých vás očakávame v NITRE!*

***Tomáš Stano***




Manifestacio antaŭ la teatrejo en Bulonjo ĉe Maro


SOMERA ESPERANTO-STUDADO
SES
www.lernu.net
SES 201
SES